de Prelegantoj de Esperanto kaj Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj el Zagrebo, Esperanto-societo "Mondo paca" el Velika Gorica, individuaj membroj de Kroata Esperanto-Ligo el Zagrebo, Esperanto-societo Rijeka k.a.

La labora parto de la programo de IAER okazis en la Urbodomo de Brežice, kiu afable malfermis sian pordon al la aranĝo. Post la ludado de "La Espero" kaj la enkonduka parolado de ***Anton Mihelič***, la partoprenantojn salutis la vicurbestrino ***Katja Čanžar***, kiu prezentis la Municipon de Brežice, aparte informante la aŭskultantojn pri la infrastrukturaj investoj en lernejojn, infanĝardenojn kaj en la evoluigon de turismo. Ŝi ankaŭ elstarigis la ĉi-momente plej grandan konstruejon en Slovenio, respektivea la hidroelektrejon Brežice, la estontan sportparkon kaj akvocentron kaj la estontan hidroelektrejon Mokrice.

La prezidanto de SIEL ***Janez Jug***, esprimis kelkajn pensojn pri la graveco de la renkontiĝo, post kio tre vigle pri la ĉefa temo diskutis pluraj ĉeestantoj. La centra mesaĝo de la enkonduka prelego kaj diskuto estis, ke oni devas esence plibonigi la intersocietan interŝanĝon de vizitoj per aktiva kunlaboro ĉe multaj jam tradiciaj kaj ankaŭ novaj esperantistaj aranĝoj en kampoj kiel edukado, kulturo, amuzo, turismo kaj sporto. Sed aparta atento devas esti dediĉita al reciproka informado kaj helpo ĉe plenumado de diversaj aktivecoj en esperantistaj societoj.

Anton Mihelič mallonge informis pri EKP kaj en aparta prezento proponis eblajn kampojn por estonta kunlaboro. ***Janez Zadravec*** prezentis "Bogračijada"-n, la urban feston de Lendava, en kiu jam tradicie partoprenas esperantistoj, kaj invitis la ĉeestantojn viziti ĝin.

En la kultura programo prezentiĝis meza kanthoro de la ***Kultura societo "Franc Bogovič"*** el Dobova, interalie tre bele per la Esperantigita slovena popolkanto "Ĝojigas min" (*Prav lepo je res na deželi*). Tri membroj de EKP (***Ivana Vatovec, Reneja Mihelič*** kaj ***Anton Mihelič***) recitis slovenan poezion de Srečko Kosovel en Esperanto. Ĉe la fino prezentiĝis la gastantaj Esperanto-asocioj kaj okazis diskuto. En la labora parto kroataj esperantistoj (***Josip Pleadin, Anto Mlinar, Roža Brletić-Višnjić***) informis la ĉeestantojn pri Esperanto-eventoj kaj aktivecoj en Kroatio, pri unuopaj societoj kaj iliaj agadoj. Kroataj esperantistoj donacis diversajn Esperanto-eldonaĵojn por la biblioteko de EKP (ekz. UZE donacis la 30-numeran kompleton de "Zagreba Esperantisto" kaj librojn, KFEA la tipajn korformajn mielkukojn de Zagrebo kaj KEL la gazeton "Tempo"). ***Mićo Vrhovac*** el Banja Luka prezentis la novan kantaron de serbaj kantoj en Esperanto, kaj eĉ tre simpatie kantis unu el ili (*Ima dana - Iujn tagojn*), je ĝojo de la partoprenantoj.

En paŭzo la ĉeestantoj povis refresigi per manĝetoj kaj gustumado de lokaj kaj regionaj vinoj en la teretaĝo de la Urbodomo, dum kio okazis tostoj kaj bondeziroj, interparoloj kaj fotadoj. La frandaĵojn preparis aninoj de la EKP ***Reneja Mihelič*** kaj ***Ivana Vatovec*** kun afabla helpo de najbaroj.

Je la 14h00 komenciĝis iom pli ol duhora vizito al la Muzeo de Posavje, situanta en la loka kastelo. En la kastela korto la gastoj estis akceptitaj kaj salutitaj de la direktorino de la muzeo, sinjorino ***Alenka Černelič Krošelj***, kiu poste kun sia kolego gvidis la vizitadon. Post la vizito de la muzeo ***Ivana Vatovec*** prezentis al la gastoj la ĉefajn karakterizaĵojn de la urbo Brežice. La muzeo montriĝis tre riĉa kaj interesa por vizitantoj. Post la vizitado de la muzeo, ĉiuj IAER-anoj veturis al la kamparana